

kaj ke tio ne instigas ĝin enkonduki esperantajn resumojn de la artikoloj kiel proponis Stuedahl. Sed se abunde venos leteroj ĝi denove konsideros la aferon. Elektroteknikistoj do povas skribi al Elektroteknisk Tidskrift, Fuglehauggt. 11, Oslo, Norvegujo.

Sven Alexandersson, sekretario de ISAE.

413.164 : {621.3 + 537/8} = 60

### INTERNACIA ELEKTROTEKNIKA VORTARO.

La Argentina Elektroteknika Komitato preparas la duan eldonon de la hispana parto de la Internacia Elektroteknika Vortaro. La vortaro havas la difinojn en hispana lingvo kaj la tradukojn de la terminoj en la lingvoj franca, angla, germana, itala kaj Esperanto. Samideanoj interesataj pri tiu verko petu informojn al „Comité Electrotécnico Argentino”, Posadas 1657, Buenos Aires, Argentino, sendante kopion de la letero al la ISAE-delegito Inĝ. Lazaro Musih, Casilla Correos 5552, Buenos Aires. Hispanlingvanoj skribu nur en hispana lingvo, alilingvanoj nur en Esperanto, se eble uzante la oficialan paperon de via firmo aŭ entrepreno, menciante la Sciencon Revuon.

003.62 : 411.5

### ENKETO PRI PRONONCADO DE FORMULOJ

de F. J. BELINFANTE (Usono).

En la junia numero (n-ro 524) de „Esperanto”, sur paĝo 76, aperis enketo pri prononcoj de literoj ktp. Ĉi tiu afero estas speciale grava por sciencistoj. Se en prelego antaŭ granda salono oni ekzemple prononcus  $dc/ds \neq dc/dz$  kiel „do co do so ne egalas do co do zo”, mi ne dubas ke multaj ĉeestantoj ne bon-aŭdos tion. Tial por la literoj kromnomoj pli facile distingeblaj ŝajnas necesaj. Por telefona uzado plursilabaj kromnomoj por nacilingvaj literoj jam estas uzataj en multaj landoj. (Nur mankas unuformeco). Tamen tiaj kromnomoj plursilabaj ŝajnas ne rekomendindaj por sciencaj formuloj. Jam sufiĉas ke kelkaj grekaj literoj estas prononcataj plursilabe (ekz. „upsilon”). Se ĉiuj literoj prononciĝus tiamaniere, oni preskaŭ duobligus la tempon necesan por eldiri formulon; tempon jam tro longan por komplikaj formuloj.

Se oni enkondukas serion de kromnomoj por literoj, uzotaj por prononcado de formuloj, (kaj la samaj povos servi por telefona uzado

aŭ eble eĉ por literumado de esperantaj vortoj en kursoj), ni samtempe evitu la samsonecon konfuzan de liter-paroj kiel m, n („em, en”) en multaj naciaj lingvoj. Kiel ekzemplo de tia alfabeto, en kiu ĉiu samsoneco inter paroj de literoj estas evitata, mi menciis (inkluzive de la literoj q, w, x, y uzataj en multaj formuloj kaj fremdnomoj):

a-bo-ce-ĉu-do-e-ef-ge-ĝi-haĉ-ĥo-i-jo-ĵe-ka-il-om-en-o-pe-qu-ru-es-iŝ-tej-u-ŭeŭ-vi-we-ix-ŭay-zet. (Prononcu q=k, w=ŭ, x=ks, y=j ĉi tie.) Kontrolu ke similonaj literoj tiamaniere havas malsimilajn nomojn: komparu najbarajn parojn en la vico l-r-h-ĥ-k-q-g-j-y-i-e -a-o-u-ŭ=w-v-f-p-b-m-n-d-t-c-s-x-z-ĵ-ĝ-ĉ-ŝ.

Kompreneble estas iom da arbitreco en tia propono. Tiu arbitreco ebligas pluajn plibonigojn. Ekz. oni eble povus (se necese) eviti nomojn, kiuj jam havas alian signifon kiel vorto uzata ankaŭ en scienca rezonado. Tial kelkaj eble preferos ekz.: a-bo-ce-ĉo-di-e-ef-ge-ĝa-haĉ-ĥo-i-jo-ĵe-ka-el-om-un-o-pe-qu-ru-es-iŝ-ta-u-ŭeŭ-vi-we-ix-ŭay-zet. (La nomo „vi” apenaŭ iam kaŭzos konfuzon.) Sed post ĉiu tia propono ĉiam kontrolu ĉu literoj similonaj (vidu vicon l-r-h-... ĉi supre) ankoraŭ havas malsimilajn nomojn. Ankaŭ kontrolu ĉu la alfabeto ne fariĝis tro malfacile parkerumebla.

Jen mi aldonas klasike-grekan alfabeton: Alfa-beta-ga(m)ma-delta-epsilon-ŭaŭ-dzeta-eta-theta-iota-ka(p)pa-la(m)bda-mu-nu-ksi-omikron-pi-r(h)o-sigma-taŭ-upsilon-fi-hi-psi-om(e)ga. (La literoj inter krampoj estas skribataj, sed estu apenaŭ elparolataj en ĉi tiuj fremdvortoj.) Ĉu oni preferas skribi „zeta” (eĉ prononcante „dzeta”)? Ĉu oni preferas „vaŭ” (aŭ eĉ „digamma”) anstataŭ ŭaŭ?

Kiam ĉi tio aperas, multaj abonantoj de „Scienca Revuo” eble jam respondis al mia enketo en „Esperanto”, ankaŭ pri la aliaj demandoj, kiujn mi ne ripetas ĉi tie. Mi jam nun ricevis multajn respondojn; multaj tamen estas de ne-sciencistoj. Pri niaj bezonoj en la prononcado de formuloj tamen mi dezirus scii viajn impresojn. Tial mi ĝojus, se tiuj legantoj de Scienca Revuo, kiuj ne jam antaŭe skribis al mi, bonvolus do nun jam sciigi al mi, kion ili pensas pri ĉi tiuj aferoj. Se eble, respondu al ĉiuj demandoj faritaj en „Esperanto” (paĝo 76); se vi iam lernis la antikvan grekan lingvon, vi ankaŭ povas aldoni vian opinion pri la greka alfabeto presita ĉi-supre.

Skribante al mi, bonvolu indiki, kiu scienca fako estas via specialaĵo, tiel ke mi povos tuj distingi vian respondon de la respondoj de laikoj en scienco! (Tamen mi ankaŭ ŝatas la opiniojn de laikoj.) Bonvolu adresi ĉion al: D-ro F. J. Belinfante, Dept. of Physics, Purdue University, Lafayette (Indiana), U.S.A.

Dankon!